

# STARTO

**N-ro 4/2017 (265)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*fotis Pavla Dvořáková*

Asocia konferenco en ĉefepiskopa gimnazio de Kroměříž  
13 – 15 oktobro 2017

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IČ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, [martinkova.sy@seznam.cz](mailto:martinkova.sy@seznam.cz), — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto:** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

**Vicprezidanto:** Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

**Komitatano:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

**UEA-kotizperanto:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz

www.muzeum.esperanto.cz

**Kontrollegis:** la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

# Konferenco de ĈEA

Kroměříž 13 – 15 oktobro 2017

La konferenco kunvenigis pli ol 80 personojn al ĉefepiskopa gimnazio en Kroměříž (vidu la titolpaĝon).



Vendrede du junularaj reprezentantoj, Léon Kamenický (surfote) kaj Tomáš Stano, prezentis kun komputilaj lum-bildoj la junularan kongreson en Togo-lando.



Post ili amatora aktorino Stáňa Hošková ludis klasikan ĉeĥan verkistinon Eliška Krásnohorská, kiu en longa monologo rakontis pri sia vivo. S-ino Hošková daŭrigas laboron de Eva Seemannová, sed ĉeĥlingve, kvankam ŝi lernas Esperanton, tamen ankoraŭ ne kapablas inter-nacilingve aktori. Ŝi scias 15 similajn monologojn.



Sabate antaŭtagmeze okazis la labor-kunsido de la konferenco.



La estraro prezentis la agadon de la asocio ekde la kongreso antaŭ unu jaro en Pelhřimov, ekonomian situacion kaj staton de membrobazo.



Koncize oni klarigis ankaŭ daŭrigon de ciferecigado de dokumentoj kaj agadon de nia Esperanto-muzeo en Svitavy.



Estis ankaŭ lanĉita nova Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro de Miroslav Malovec (583 paĝoj de formato A5), eldonita de KAVA-PECH.



Pri siaj aktivecoj raportis ankaŭ Jan Příborský, estro de la Sekcio de nevidantoj de ĈEA kaj kiel gastoj Leon Kamenický nome de Ĉeĥa Esperanto-Junularo kaj Jindřich Tomíšek nome de Ĉeĥa Fervoja Esperanto-Asocio.

Antaŭ la tagmanĝo Max Kašparů en la gimnazia kapelo festparolis pri supraĵemo de la nuntempa homa socio.

Posttagmeze la konferencanoj vizitis ĉefepiskopan vinkelon kun ĉiĉerona klarigo kaj gustumado.

Antaŭ vespermanĝo Dagmar Martínková rakontis pri UK en Seulo, kiun ŝi

partoprenis, projekciante siajn fotojn. La tagon finis amuza babila programo kun tombolo kaj kun konkurso de kvar grupoj, kiuj devis diveni, por kio servas dek misteraj objektoj.



Libuše Dvořáková priskribis agadon de Esperanto-Muzeo kaj atendatan dumvintan rekonstruadon en la domo.

Dimanĉan programon malfermis prelego de Jana Křížková pri L. L. Zamenhof, dum kiu en alia ĉambro ĉeĥa radio registris intervjuojn kun Miroslav Malovec pri la nova vortaro, Libuše Dvořáková pri Esperanto-muzeo en Svitavy kaj kun Libuše Hýblová pri ĈEA, kiun ŝi prezidas. Pavla Dvořáková prezentis la duan parton de la raporto pri la agado de la muzeo. Lenka Angelová nome de AEH konatigis la ĉeestantojn kun la ideo organizi karavanon al la 103-a UK en Lisbono en 2018.

Poste sekvis prezento de la sekva konferenca urbo Benešov apud Prago (Leonarda Chaloupková) kaj preparo kaj aprobo de la konferenca rezolucio.

Miroslav Malovec  
fotoj O. A. Fischer

## Usnesení konference

Českého esperantského svazu, z. s.,  
která se konala v Kroměříži ve dnech  
13. - 15. října 2017

### Konference schválila:

zprávu o činnosti ČES za období listopad 2016 až září 2017,  
zprávu o hospodaření za období listopad 2016 až září 2017.

### Konference doporučuje:

1. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost,
2. členům ČES sledovat webové stránky [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) a [muzeum.esperanto.cz](http://muzeum.esperanto.cz),
3. klubům a sekcím zveřejňovat informace o své činnosti prostřednictvím Starta, webových stránek a facebookové stránky Esperanto.cz

### Konference vyzývá:

1. všechny členy a organizační složky svazu navrhnout možnosti propagace Muzea esperanta ve Svitavách u příležitosti 10. výročí otevření Muzea a navrhnout program oslav v roce 2018,
2. členy k větší aktivitě v přispívání do Starta a na webové stránky svazu,
3. zájemce o pomoc s vytvářením Starta, aby se přihlásili výboru,
4. k spolupráci s Českou esperantskou mládeží, z.s.

### Konference ukládá:

1. výboru obnovit formální spolupráci s Českou esperantskou mládeží, z.s.

### Konference bere na vědomí:

1. zprávu o činnosti složek ČES za období listopad 2016 až září 2017.

V Kroměříži 15. 10. 2017

## Raporto pri Informa agado

**Amaskomunikiloj:** Realiĝis 6 elsendoj pri Esperanto en radio kaj 1 elsendo en regiona televido. Samtempe, aperis 26 artikoloj pri Esperanto. Kompare kun antaŭa jaro aperis pli da artikoloj de redaktoroj, kiuj ne estas esperantistoj (en pasinteco pli ofte aperis raportoj en lokaj gazetoj pri esperantaj aranĝoj). Inter plej gravaj artikoloj eblas kalkuli artikolon en retejo de Ĉeĥa radio (Český rozhlas) aŭ en juda gazeto Maskil.

### Publikaj prelegoj:

Kronologie realiĝis sekvaj ĉeĥlingvaj prelegoj rilataj ĝenerale al Esperanto - en Biblioteko de Mahen en Brno (M. Malovec kaj J. Vojáček), Biblioteko Přelouč (J. Kříž), Unitaria Prago (diskuto kun G. Silber pri Esperanta literaturo, kunlabore kun EK Prago) kaj Biblioteko Vrdo (P. Chrdle: *Pri F. V. Lorenc en lia naskiĝloko*).

### Informado pri doktoro Zamenhof

Pri d-ro Zamenhof informis granda parto de la priesperantaj artikoloj aperintaj en la ĉeĥa gazetaro.

Du multlingvaj paĝoj pri Zamenhof estis tradukitaj en la ĉeĥan lingvon: Miroslav Malovec tradukis paĝon [zamenhof.life](http://zamenhof.life) (kreita origine de UEA), Petr Diblík tradukis paĝon [zamenhof.info](http://zamenhof.info). Pavla Dvořáková preparis ekspozicion pri la vivo kaj verkoj de Zamenhof okaze de la nova ekspozicio „Homo kontraŭ Babelo“ en muzeo de Esperanto en Svitavy kaj dum la jubilea tago aperigis ĉeĥlingvan artikolon en Esperanto.cz. J. Křížková pretigis genealogian arbon de la familio Zamenhof kaj biografian prelegon, kiun ŝi prezentis dum la Regiona Renkontiĝo en Česká Třebová kaj dum la ĈEA-Konferenco. La prelego estis filmita kaj disponigita ĉeĥlingve en interreto..

Dum la inaŭguro de nova ekspozicio okazis ankaŭ prelegoj de Bernhard Tuidler de la muzeo de Esperanto en Vieno kaj Laŝa Ĉahunaŝvili de organizo E@I pri la retejo [zamenhof.info](http://zamenhof.info). P. Chrdle prelegis pri Zamenhof en la Sinagogo Maisel en Prago. 25 novaj multmediaj dokumentoj aperis en la [albumo Zamenhof](#) en la Muzea paĝo ĉe Ipenity.

## **ĈEA-informiloj**

### **1. Starto**

La gazeto aperis kiel kutime, en kaj papera kaj elektronika formoj. Daŭre sentatas manko de kunlaborantoj kaj serĉatas kompetentulo, kiu povus anstataŭi M. Malovec en lia multjara ĉefredaktora laboro.

### **2. Retejo Esperanto.cz**

Post la kongreso en Pelhřimov Pavla Dvořáková transdonis sian sesjaran ĉefredaktoran postenon al M. Hruška. Plu ŝi restas membro de la redakcejo (kaj de ĈEA-Retkomunikoj). Dum la jaro aperis en la retejo 32 ĉeflingvaj kaj 27 esperantlingvaj aktualaĵoj. La ĉefa asocia retejo estis regule vizitata, en periodo 2016/11 ĝis 2017/9 „gastis“ la retejo averaĝe 1640 vizitojn monate. Pli ol 80 % da vizitantoj estas el Ĉeĥio. Preskaŭ 68 % da vizitantoj venas al nia retejo baze de serĉado ekzemple per Guglo.

### **3. ĈEA-Retkomunikoj**

Neregula elektronika komunikilo sukcese reaperis en tiu ĉi jaro. Ĉefredaktoro Miroslav Hruška ekuzis pli modernan dissendilon, servon Mailchimp. Dank al tio estas la laboro pli komforta kaj rapida. Ankaŭ la mesaĝoj estas nun pli bone legeblaj. En tempo de skribado de tiu ĉi raporto estis senditaj sume 5 ĈEA-Retkomunikojn al 329 ricevantoj el Ĉeĥio kaj al 48 el eksterlando. Servon

Mailchimp ja eblas ankaŭ uzi ne nur por dissendado de ĈEA-Retkomunikoj. Dufoje la redakta teamo per tiu ĉi servo dissendis amasan invitilon en la ĉeĥa lingvo.

### **5. Muzeaj retejoj**

4 muzeajn retpaĝojn plu redaktas Pavla Dvořáková.

#### **5.1. Oficiala muzea paĝaro**

[Muzeum.esperanto.cz](http://Muzeum.esperanto.cz)

De novembro 2016 en ĝi aperis 7 novaj artikoloj kaj 3 fotogalerioj kaj kompleksa ĉeflingva agadraporto. Sekcio „*Ligiloj*“ estis ĝisdatigita kaj estis kreita nova rubriko pri literaturo pri bibliotekoj kaj muzeoj.

#### **5.2. Muzea paĝo ĉe la socia retejo en Ipenity**

- estis fondita en 2011/1 kaj nuntempe enhavas 53 fotoalbumojn kaj 2030 dosierojn kun diversaj fotoj, videoj kaj sonregistraĵoj. En la lasta jaro estis fonditaj tri novaj albumoj kaj alŝutitaj 170 novaj dokumentoj. Dum la jaro vizitis la paĝon pli ol 16 000 vizitantoj (ekde 2011 pli ol 131 000). En la muzea reto troviĝas membroj el 95 landoj.

#### **5.3. Paĝo ĉe Facebook - Muzeum esperanta Svitavy**

Dulingva paĝo aperigis dum la jaro kvindek da informoj dum la jaro kaj estas "ŝatata" de 459 uzantoj.

#### **5.4. Grupo Amikoj de Muzeo de Esperanto en Svitavy**

ĉe Facebook havas 380 membrojn el pli ol 40 landoj de ĉiuj kontinentoj. En la lasta jaro aliĝis ĉi. 20 personoj. Ĝi aperigis 34 aktualaĵojn. Kompare kun la antaŭa paĝo la avantaĝo estas, ke la membroj estas rekte informataj pri la novaĵoj.

*Miroslav Hruška*

## Raporto pri

### Esperanto-Muzeo en Svitavy

La muzeo troviĝas en la teretaĝo de Ottendorfer-domo, samtempe ĝi estas sidejo de ĈEA kaj de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy. La spacoj estas uzataj senpage surbaze de kontrakto inter la urbo Svitavy kaj ĈEA. La nuna kontrakto validas ĝis 31.12.2019. La spacojn flegas lokaj klubanoj.



Ĉi-junie estis instalita nova ekspozicio „La Homo Kontraŭ Babelo“, dediĉita al 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof kaj samtempe al F.V. Lorenc kaj Theodor Ĉejka (kuratoris P. Dvořáková). La ekspozicion subvenciis Regiono Pardubice per 10.000,- Kč. La vernisaĝo sekvis post Muzea Nokto. En la posttagmeza programo de Muzea Nokto prelegis Petr Chrdle pri „F. V. Lorenc – forgesita geniulo“. Samtempe estis lanĉita libro pri F. V. Lorenc eldonita de KAVA-PECH ĉeĥe kaj Esperante. Patronoj de la libroj fariĝis Martin Stuppniĝ el Aŭstrio kaj Margit Turková. Sekvis prelego de Ján Vajs pri renkontiĝo de esperantistoj en Nepalo, kiun li partoprenis komence de la jaro. En la muzea-nokta vespero ni ĉiam revenas 100 jarojn en la pasintecon.

Ĉifoje nin vizitis Ludoviko Zamenhof (Jan Řepa) kun edzino Klára (Dagmar Martinková). En la sabata programo parolis B.Thuider, direktoro de la viena Esperantomuzeo, kaj la informan retejon [zamenhof.info](http://zamenhof.info), kreitan de E@I, prezentis kartvela volontulo de tiu organizo, L. Ĉachunašvili. Vespere koncertis grupo NOPROBLEM kantante esperantlingve.

Plie en la muzeo okazis 10 prelegoj pri vojaĝoj de movado Brontosaurus, kiujn organizas klubano Jan Richtr. La prelegoj destinitaj por la publiko estas ĉeĥlingvaj por kvardeko da aŭskultantoj.



La Muzean Nokton partoprenis ankaŭ Sachiko Hayashi el Japanio, kiu deziris viziti Terezín, Lidice, kaj muzeon de Oskar Schindler en Brněnec. Loka kabla televido filmis mallongan raporton kaj tra Svitavy ĉiĉeronis historiisto Radek Fikejz.

Fine de junio nian muzeon vizitis juna kanada esperantisto Donovan Downes, kiu diskutis kun lernantoj de elementa lernejo Riegrova. Por pluraj tagoj venis hungaro Thomas Halash, poste Shayash Ayach el Parizo, fine de aŭgusto partoprenantoj de renkontiĝo en la pola Duszniky-Zdrój, kiun organizas Teresa Pomorska.



La **muzean librokolekton** dekomence flegas Marie Ĉumová, kiu ĉi tie laboras plurajn tagojn semajne. Ekde 2014 ŝi zorgas ankaŭ pri Libro servo de ĈEA. La kolekto daŭras. La muzeo akiras librojn, gazetojn kaj aliajn objektojn (kutime post niaj mortintoj), kiujn Marie Ĉumová ordigas kaj registras.

Ni jam havas pli ol 17.560 titolojn. Sed en la depono kvaroblon. La muzeon pridonacis jam 70 unuopuloj aŭ kluboj. Ĉio estas registrita, duoblaĵoj proponitaj al eksterlando por interŝanĝo aŭ malmultekoste ofertitaj dum konferencoj al unuopuloj.

En septembro 2017 la muzeo ricevis altvaloran ampleksan kolekton pri bildkartoj (de László Szilvási el Kultura Esperanto-Asocio, Hungario) kaj en oktobro 2017 librodonacon nome de la Krakova Esperanto-Societo. Lastatempe ni donacis duoblaĵojn al nova Esperanto-muzeo en Ĉinio kaj biblioteko L. L. Zamenhof en Bialistoko. Dankleterojn sendas Petr Chrdle, kiu mem donacas librojn el sia eldonejo, el eksterlando plej ofte donacas eldonejo Lorenz el Brazilo.

ĈEA eldonis novajn glumarkojn de Esperanto-muzeo, kiuj estis vendataj ankaŭ en konferenco en Kroměříž. Per

donaco de ĈEA-anino estis aĉetitaj **nova komputilo** por esploristoj kaj datumdeponilo, kiuj estos instalitaj post reconstruo de la muzeo. El Biblioteka Apogo Bachrich ĈEA akiris en 2016 librojn por 159 eŭroj.

Decembre 2016 Pavla Dvořáková finis tri bibliotekistajn interretajn kursojn (inkl. ciferecigadon) kaj partoprenis nome de ĈEA tutŝtatan konferencon pri ciferecigado en muzeoj kaj bibliotekoj. Dagmar Martinková frekventis tutjaran kurson „Fundamentoj de muzea pedagogio“ en Brno.

Malnova enhavo en la **elektronika informkiosko** en la muzeo bezonas ĝisdatigon, tamen pro teknikaj problemoj nuntempe ankoraŭ ne eblis tion fari.

**Virtualajn kolektojn** prilaboras P. Dvořáková kaj parton disponigas en la muzeaj retejoj [Muzeum.esperanto.cz](http://Muzeum.esperanto.cz) kaj la [paĝo ĉe Ipernity](http://paĝo_ĉe_Ipernity). Pliaj informoj disponeblas en la Raporto pri la informagado (p.101). En 2017 ŝi realigis ankaŭ historiajn esplorojn pri la movado, kies rezultoj estos aperigitaj en Starto en 2018.

\* \* \*

La reconstruo de la muzeo okazos pro malbona stato de unu muzea muro. Dum pluraj jaroj tralikiĝis humido el la najbara spaco. Komence de 2018 estos malmuntita murgarnaĵo, la humida stuko forigita, farita nova kaj sekvos murkolorigo. La muzeo estos fermita por du monatoj, sed povas esti pli longe. Informos [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj [www.muzeum.esperanto.cz](http://www.muzeum.esperanto.cz).

*Libuše Dvořáková*



## Prelego de Max Kašparů en Svitavy



Merkrede la 22-an de novembro 2017 Max Kašparů venis prelegi en la Esperanto-muzeon, invitita de la loka Esperanto-klubo. Li prelegis pri la temo „Hipnoto – ĉu mito aŭ realo?“ Kiu havas feliĉon aŭskulti tiel kleran personon kiel Max – psikiatro, juĝeja eksperto pri tiu fako, ĝenerala kuracisto, stomatologo, pedagogo, verkisto, membro de Konsilio de Ĉeĥa Televido, altlerneja profesoro kaj teologo?



Ĉar li ne estis en Svitavy la unuan fojon, ni preparis la prelegon en granda salono de Ottendorf-dono. Li bonvenigis siajn aŭskultantojn per vortoj „Mi bonvenigas vin en la ĉefurbo de Esperanto en nia respubliko kaj Esperanton mi varme rekomendas.“ Tio kompreneble plezurigis la ĉeestantajn esperantistojn. La ceteraj interes-kluboj povas envii, ke en nia rondo aktivas tiel grava presono.

Venis aŭskultantoj ne nur el Svitavy. Ili konatiĝis kun tiu ĉi sendolora kuracmetodo kaj kun ĝia vasta apliko en la praktiko. Pri la apliko devas decidi psikiatro. La prelego daŭris unu horon kaj pluan horon oni diskutis.



La aŭskultantoj povis aĉeti librojn verkitajn de Max Kašparů eldonitajn lastatempe. Ĝis nun li eldonis 25 publikaĵojn. Libro „Hipnoto, pastoralo kazo“ eĉ estis eldonita en Svitavy en eldonejo Trinitas. Libron „Pri vagaj cirkloj kaj vagaj ŝtonoj“ la aŭtoro dediĉis al siaj amikoj esperantistoj. Epizodojn el sia pli ol tridekjara praktiko de psikiatro kaj ĝenerala kuracisto li bele priskribas en libroj „Tridek epizodoj aŭ malgranda, blanka, globa“ kaj „Supren kaj oblikve“. Fine li subskribis siajn verkojn por interesatoj.

*Libuše Dvořáková*

## Soleno de KAVA-PECH

La 13-an de novembro 2017 en sidejo de Asocio de Interpretistoj kaj Tradukistoj en Prago (JTP) kunvenis amikoj de Petr Chrdle por soleni la 25-an datrevenon de lia eldonejo KAVA-PECH kaj lanĉi du novajn vortarojn.



En apuda ĉambreto estis preparita provizora libroservo. Petro prezentis al ni ankaŭ sian filinon.



Je la 17-a ĉiuj kolektiĝis en salono.



La ĉeestantojn bonvenigis sekretario de la tradukista asocio Petr Kautský kaj transdonis la vorton al Petr Chrdle.



Tiu koncize prezentis historion de la eldonejo. Li klarigis, ke la mallongigo KAVA-PECH signifas *Kongresová a vzdělávací agentura Petra Chrdleho* (Kongresa kaj kleriga agentejo de Petr Chrdle), ĉar li komence ĉefe organizis seminariojn kaj konferencojn. Poste li volis eldonigi prelegarojn, sed ĉiuj eldonistoj rifuzis produkti tiujn malgrandajn eldonkvantojn: aŭ ili priridis lin, aŭ donis tiom altan prezon, ke neniu estus partopreninta tiun konferencon. Tial li decidis registriĝi kiel eldonejo kaj eldoni ilin kun propra ISBN (Internacia norma libronumero) kaj produktis ilin mem „surgene“. Tiel li fariĝis eldonisto. Necesas aldoni, ke se tiam ekzistus nun kutimaj diĝitaj presejoj, lia eldonejo ne estus fondita.

Ĝis nun li eldonis 196 librojn sub sia ISBN, de tio preskaŭ duono iel rilatas al Esperanto. Kaj proksimume la saman nombron laŭmende kun fremdaj ISBN, ofte eksportataj eksterlanden (ekz. por SAT kaj La nova PIV kaj PIV 2005, por FEL, IEI, ESE, ktp.).

Poste li prezentis siajn multjarajn kunlaborantojn Zdeněk Pluhař kaj Helena Pšeničková, grafikiston Luděk Neužil, ilustristojn Pavel Rak kaj Mirka Tomeč-

ková kaj libroteniston (la du lastaj ne ĉe-  
estis) kaj ankaŭ siajn aŭtorojn kaj tradu-  
kistojn, esperantistajn kaj ĉeĥajn, ĉar  
KAVA-PECH eldonas ĉefe ĉeĥajn li-  
brojn. Li ne forgesis rememori pri la  
forpasinta edzino Stanjo (komune ili ver-  
kis lernolibron de Esperanto), kaj laŭdi  
nunan vivopartnerinon Milada Broumo-  
vá, kiu zorgis la libroservon kaj bakis la  
disponeblajn bongustaĵojn, sed ĉar ŝi  
volonte kaj bele desegnas, li jam igis ŝin  
ilustri du librojn.



En la dua parto de la programo estis  
lanĉitaj la du vortaroj. Unue la slovaka-  
ĉeĥa kaj ĉeĥa-slovaka vortaro por voja-  
ĝantoj (de diferencaj esprimoj), verkita  
de Vladimír Němec kaj Magdalena Feifi-  
čová, kiu ĝin persone prezentis. Nun  
aperis jam la kvara eldono, tial ĝi fariĝis  
la plej sukcesa eldonaĵo de KAVA-  
PECH. La verkon patronis Petr Kautský.

Sekvis prezento de Granda Ĉeĥa-  
Esperanta Vortaro de Miroslav Malovec,  
kiu koncize rakontis pri la ekesto de la  
vortaro. La patrono estis Tomáš Břichá-  
ček, prezidanto de la praga E-klubo.

Poste oni alportis ĉampanjon, la kvin  
personoj trinkis por deziri sukceson al la  
vortaroj kaj la gastiganto invitis la ce-  
terajn ĉeestantojn, ke ili priservu sin per  
vino kaj kukoj en la antaŭĉambro.

La programo estis trifoje riĉigita per  
kantado sub gvido de Pavla Dvořáková,  
kiu sukcesis kantigi ankaŭ la ĉeestantojn,  
ĉeĥe, slovake, kaj ankaŭ esperante.

Dum la restanta tempo de la solenaĵo  
okazis neformala babilado kaj diverste-  
maj seriozaj sed ankaŭ gajaj interparoloj.



Inter la gastoj aperis ankaŭ fama eldon-  
isto Ivo Železný, iama redaktoro de Star-  
to, kaj Pavel Polnický, eksa asocia sekre-  
tario.



Eksterlanda gasto estis verkisto kaj tra-  
dukinto Benoîte Philippe, aganta en  
Saksa E-Biblioteko. KAVA-PECH eldon-  
nis lian verkon Badenlanda Legendaro  
de la Konstanca Lago (1998) kaj tra-  
dukon de la verko de Jürgen Helfricht La  
Dresdena Sinjorina preĝejo. Nun li in-  
struas en Prago la germanan kaj la fran-  
can kaj mem lernas la ĉeĥan.

Aliaj fotoj de la solenaĵo videblas ĉe:  
<https://www.zonerama.com/petrchrdle/Album/3890561>


Teksto Miroslav Malovec, fotoj Luděk Neužil

## JUNULARA KONGRESO

### IJK 2017

Ĉi-somere, ekde la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto, okazis la unua IJK en Afriko. Pli specife en la marborda urbo de Aného en Togolando proksime de la landlimo kun Benino. Dank' al la projekto pri la eŭropafrika kunlaboro, mi povis partopreni IJK-n nome de SKEJ kune kun 8 aliaj Slovakoj.

Kvar el ni alvenis al Lomé (ĉefurbo) merkrede la 2-an de aŭgusto. Ni estis ege surprizitaj pri la moderneco de la loka flughaveno. La resto de la lando estis tute malsama. Ĉar ni alvenis nokte, nia unua impresio iomete distordiĝis. Dum la vojo al la hotelo ni spertis multajn kontrastojn. Unuflanke giganta haveno lumigita de miliono da lumoj, aliflanke malriĉaj setlejoj proksime al kiuj troviĝis nia hotelo. Dum la tempo de vojaĝo al hotelo ni pensis, ke nia ŝoforo mortigos nin, sed feliĉe ni ankoraŭ estas ĉi tie. Nia vojaĝo finiĝis en plaĉa dometo sur la plaĝo. Nur matene ni rimarkis, ke ni fakte estas ne pli ol 3 metrojn de la oceano.



La sekvan tagon, la sama ŝoforo kondukis nin ĉirkaŭ la urbo kaj sam-

tempe fariĝis nia gvidianto. Komence, li montris al ni la vilaĝon de artistoj, kie ni ankaŭ aĉetis memoraĵojn. Li kondukis nin al la Nacia Muzeo, al la plej bela kvartalo de Lomé, al la merkato de fetiĉoj, kie ni povus aĉeti korpojn de mortaj bestoj.

La trian tagon la ŝoforo veturigis nin al la kongresejo. Ĝi okazis en internulejo kun ĉambroj kun multaj litoj (ok por ni), dividitaj necesejoj (kun blatoj) kaj duŝejoj (ni lavis nin per akvo de siteloj). Preskaŭ ĉiuj homoj venis sekvan tagon kiam la kongreso oficiale komenciĝis.



Mi ne skribos pri unu tago post la alia, sed nur pri la plej gravaj eventoj kaj mi volas komenci kun koncertoj. Komence ni povis ekkoni afrikan kulturon dank' al du kantistoj. De mia vidpunkto, la dua estis pli interesa, kvankam li dancis pli ol kantis. Alia koncerto estis Jonny M kun Esperanto-reggae ("Majstro de diskej' skej skej skej ..." estis vere amuza). Ni ĉiuj havis bonan tempon. Poste ni havis interesan koncerton de Joel en gufujo\*. La antaŭlastan nokton (kaj mian lastan) la koncerto de Kim okazis. En tiu tempo neniu sentis sin sola, kaj ĉiuj amuziĝis ĝis la nokto nokto fin'.

\* gufujo = nokta junulara te-trinkejo



La tuttaga ekskurso al la bela akvofalo en Kpalimé estis ankaŭ interesa. Ni banis nin en la refreŝiga akvo. Estus eĉ pli bone se la vojaĝo tien kaj reen ne daŭrus 10 horojn entute. Ĉiukaze, plantejo kun kafo kaj kakao plibonigis la situacion. Ĉu vi sciis, ke la fruktoj de kakao ankaŭ havas blankan pulpon, kiu estas tre bongusta? Ni kutime konsumas nur enon de la frukto kaj la pulpo estas ĉiam forĵetita.



Ni ankaŭ havis la ŝancon viziti la historian vilaĝon de Togoville sur la bordoj de la lago Togo, kie la Virgulino Maria en 1965 aperis. Tiu-ĉi loko estis vizitita de la papo Johano Paŭlo II. La plej amuza evento okazis ĝuste post la alveno en la vilaĝo. La loĝantoj portis nin el ŝipoj al la tero en siaj brakoj por ke ni ne tuŝu la akvon (kaj poste petis monon de ni).

Kruelega evento estis, kontraŭe, iu ventra viruso. Mi pensas ke neniu evitis ĝin. Ĝi estis malsano de malbona higieno, kiun lokaj loĝantoj, bedaŭrinde, renkontas regule pro manko da rimedoj kaj scioj. Kelkaj eĉ devis viziti malsanulejon.

Fine mi ŝatus alproksimigi vin al la impresoj de Afriko pli ĝenerale. Ĝi estas lando plena de kontrastoj, kie du mondoj renkontiĝas – la tradicia loka kaj la “moderna”, kiun ni konas el Eŭropo. Oni povas ankaŭ posedi du poŝtelefonojn loĝante nur en du-metro-longaj pajlaj dometoj. Sur ĉiu vojo vi povas vidi motociklojn kaj senti odoron de benzino, kiun Afrikanoj ankaŭ vendas en plastaj boteloj. Vi povas vidi grandegajn hotelojn apud malriĉaj kabanetoj. La terura afero estas, ke rubaĵo estas ĉie kaj homoj necesejumas, kie ili volas.



Estas multe da aferoj por ŝanĝi tie, sed ekzistas ankaŭ multaj belaj aferoj por ekkoni. Ekzemple la amantaj infanoj, kiuj vokis nin “Yovo” (en sia lingvo tio signifas “amuzaj blankaj homoj”), belaj multkoloraj ŝtofoj kaj vestaĵoj, sed la plej grave la dancantaj homoj, kiuj simple ĝuas la vivon.

*Paulína Jalakšová*

# LA PLEJ BONAJ PRAKTIKOJ EN INSTRUADO

La Plej Bonaj Praktikoj en Instruado (PBPI) estas nova projekto de multaj E-organizoj: GEJ (Germanio), HEJS (Hispanio), TEJO (Nederlando), Trenta E-Asocio (Italio), Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo (Francio), E@I (Slovakio), Bjalistoka E-Societo (Pollando) kaj Ĉeĥa Esperanto-Junularo (Ĉeĥio).

La projekto estas financata de Eŭropa Unio.




La projekto konsistas el kvar renkontiĝoj, el kiuj la unua ĵus okazis en Trento, Italio de la 6a ĝis la 8a de oktobro. La unua renkontiĝo estis organiza, ankoraŭ ne partoprenis ĝin tiuj, kiuj kleriĝos dum la projekto. Venis reprezentantoj de ĉiuj menciitaj asocioj por preparoli la detalojn de la projekto kaj elpensi kaj finorganizi ĉiujn ĝis tiam nefiksitajn erojn.

Sekve mi volus prezenti la projekton. Mia prezento enhavos multajn informojn, pri kio ni decidis dum nia tre laborplena kaj vere fruktodona kunsido.

La tri aliaj renkontiĝoj estos plej ver-

ŝajne en la fino de decembro en Teŝino (Pollando) dum Junulara E-Semajno, en Tuluzo marte kaj en Slovakio en julio dum Somera Esperanto-Studado.



Tiuj renkontiĝoj jam ne estos organizaj, ilia celo estas la trejnado de ontaj E-instruistoj. La trejnistoj estas ĉefe junaj, sed nepre spertaj E-instruistoj kun fona kono de instruado, metodologio, didaktiko, pedagogio kaj lingvistiko. Nepra kondiĉo por partopreni estas bona kono de Esperanto (almenaŭ en la nivelo B2).

Plia kondiĉo rilatas al la spertoj pri instruado. Ni celas, ke la duono de la partoprenantoj estu vere entuziasmaj pri instruado, sed ili ne vere devu havi spertojn. Ilian malspertecon ekvilibros la dua parto de la partoprenantoj, kiuj jam instruis kaj havas iajn spertojn, sed tamen volus pliprofundigi siajn sciojn kaj kapablojn.

La elekton de la ĝustaj homoj fortigos la 2-ŝtupa aliĝprocezo: sendado de vivresumo kaj motiviĝletero kaj skajpa intervjuo. Prioritato estas nepre, ke la en la fino la kompetentoj kaj kapabloj de junaj volontuloj fortiĝu, ili ekhavu memfidon. Ili uzu siajn ekhavitajn sciojn por persona evoluo, asocia agado kaj profesiiĝo de instruado.

Dum la projekto ankaŭ kreiĝos retpaĝo [instruado.esperanto.cz](http://instruado.esperanto.cz), kiu devos servi kiel helpilo por la ontaj instruistoj. Ĝi ne celas helpi nur la trejnatojn, sed ankaŭ la estontajn instruistojn de Esperanto. La projektoplano skribas, ke tiu retpaĝo devas havi en si informojn pri la projekto, gvidliniojn por ontaj instruistoj kaj ankaŭ lernomaterialojn.

La gvidlinioj por instruistoj estos materialaro, kiu prezentos la fakajn fonojn, praktikojn kaj konsilojn pri lingvoinstruado. Ĝian kreiĝon grandparte formas la materialoj kreitaj ĉefe de la trejnistoj laŭbaze de iliaj trejnadsesioj. Tio plifaciligas la lernadon de la trejnatoj kaj la materialkreadon de la trejnistoj.



Estas grava gvidlinio por ĉiuj partoprenantoj, ke ni celas bonkvalitecon kaj rilate al la trejnado kaj rilate al la materialoj. Kiel mi menciis, la retpaĝo devos enhavi ankaŭ lernomaterialojn. Nia organiza teamo decidis, ke la lernomaterialoj ne konkurencu kun aliaj retpaĝoj kaj fontoj de lernomaterialoj, sed provu ilin kompletigi. Do pensinte pri tio, kiuj materialoj eventuale mankas en Esperantujo dum instruado, ni vidis, ke tio verŝajne estas sonmaterialoj, videomaterialoj kaj taskoj por tiuj ĉi lerniloj.

Dum la tuta trejnado ni koncentriĝos je surbendigo de sonaĵoj kaj videaĵoj de internacia medio, ni (trejnistoj kaj trejnatoj) kreas taskojn por ili, kaj ĉio ĉi estos alŝutita al la retpaĝo de la projekto por ontata uzo senpaga por iu ajn kiu emos instrui. La materialoj estos kreitaj de la nivelo A1 ĝis B2 surbaze de la temlisto de la KER-ekzamenoj.



Se temas pri la temoj de la trejnado mem, ili estos plej verŝajne la sekvaj: E-istruado, publika parolo, kulturaj diferencoj, tipoj de lernantoj, KER-sistemo, E-kulturo kaj movado, metodologio, superrigardo de ekzistantaj E-materialoj, tiklaj punktoj de gramatiko, kursotipoj, lecionplano, kreado de E-lerniloj, videbligado, ludoj, didaktiko, distanca kursgvidado, daŭrigebloj de kleriĝo pri instruado, reklamado kaj retrokoplado. La projekto kompreneble ne emas instrui ene de unu jaro materialojn de kvar, sed celas doni superrigardon al ĉio por pli facila posta evoluo de la trejnatoj. Se vi emas aliĝi al la sekva(j) renkontiĝo(j) de la projekto, ne hezitu, aliĝu jam nun!

*SZILVA Szabolcs*

Ĉesky:

<http://mladez.esperanto.cz/cs/la-plej-bonaj-praktikoj-en-instruado/>

# La 25-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

TOSSA DE MAR 30.9. - 7.10 2017

La jubilea Esperanto-Semajno estis ĉi-jare organizita fare de la nova teamo de katalunaj esperantistoj. La torĉon transprenis la ĉeforganizantino Rosa López. Luis Serrano Pérez, kiu senlace laboris por Esperanto ĝis la lasta momento de sia vivo, forpasis la 24-an de aŭgusto en sia 91<sup>a</sup> jaro. Ni omaĝis lin dum la renkontiĝo.



La eventon partoprenis 108 geesperantistoj el 12 landoj (Belgio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irlando, Italio, Latvio, Litovio, Svedio, Svislando). La evento okazis en kvarstela hotelo *Don Juan*. Je dispono estis granda naĝbazeno sur tegmenta teraso, kie kelkaj el ni agrable baniĝis. Ne agrabla estis renkonto kun meduzoj de du partoprenantinoj, kiuj volis ĝui la maron.

Dimanĉe okazis malfermo de la Semajno. Bonvenigis nin la skabeno de la urbodomo s-ro Sergio Bruno. Pro la balotado por la sendependiĝo de Katalunio la urbestro Gisela Saladich Parés ne povis ĉeesti la solenaĵon.

La programo estis riĉa kaj tamen restis multe da tempo por ripozi. Okazis du interkonaj vesperoj kun ŝaŭm-vino kaj "moskatel"-vino kaj kelkaj almanĝaĵoj. Krome ne mankis tradicia *cremat-vespero*.



Ateliero pri Esperanto temis pri praktikado de la lingvo, sperte gvidate de Luz Vázquez, kiu ankaŭ prezentis sanigadon de Bruno Gröning laŭ spiritaj fortoj. Ana Manero sciigis nin pri la madrida biblioteko Juan Regulo Pérez. Gian Carlo Fighiera prezentis du dramojn de *Shakespeare: Macbeth* kaj *Hamlet*. Ĉiuj bone amuziĝis ĉe la ludo: Kiu volas fariĝi milionulo? inspirita laŭ televida programo "Ĉu vi volas fariĝi milionulo?" En niaj modestaj kondiĉoj ni kontentiĝis nur pri milionulo. Ĝi estis preparita kaj tre lerte prezentata de José Antonio del Barrio (Tonjo). Li ankaŭ informis pri la nuna stato de Esperanto en Hispanio. Thierry Saladin parolis pri la Internacia peticio kaj projekto TUJ! Li ne forgesis vendadi porokazajn T-ĉemizojn.



Aperis nova programero "Peçakuço", en kiu ĉiu partoprenanto devas rakonti en limigita tempo pri difinita temo helpe de bildoj. Komencis Tonjo pri la temo: "Kiel filoj de esperantistoj estas geniuloj", Hubert De Meyere klarigis kiel "Uzi sian kapon", Angel Garcia parolis pri "Kosmaj distancoj kaj vojaĝoj", Martine Demouy promenigis nin tra la urbo "Périgueux", Michel Chadelaud informis pri migrado kun sia edzino Annette dum "16 tagoj sur la pado de Kompostelo". André Grossmann prezentis diversajn trukfotajn. Ĝi estis tre interesa programo.



Okazis aŭkcio por akiri iom da mono por la asocio. Kun granda sukceso prezentis ĝin Tonjo. Vendiĝis pluraj donacitaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj kun aldonaj objektoj.

Dum la ĵaŭda vespero la folkloro grupo *Esbart San Pol de Mar* regalis nin per belega spektaklo de tipe katalunaj dancoj. Ĉe la fino estis prezentata danco *sardana* kaj la dezirantoj povis kundanci. La kutiman programeron de opero anstataŭis deklamado de poezio, kiun iniciatis Angel Argilos ŝatanto kaj verkisto de poemoj. Partoprenis pluraj samideanoj. Pri latviaj birdoj kaj kuraĝaj

junuloj ni eksciis de Aldis Buŝs. La vendreda vespero finiĝis per kolektiva kantado sub gvido de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.

La premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Ana Manero pro ŝia meritplena laboro por Esperanto en Hispanio. La nove ellaborita trofeo kun portreto de Ada tre plaĉis al ĉiuj. Ankaŭ Gian Carlo Fighiera ricevis ĝin por rememoro pri sia kara edzino.

Dum la unua duontaga ekskurso okazis gvidata vizito en la urbeto *Tossa de Mar*. La ĉiĉerono konigis al ni ĝian historion kaj montris interesajn lokojn. Impona estas la kastelo, kiu etendiĝas sur la monteto, de kie ni observis la marbordon kaj la vastan ĉirkaŭaĵon. Montrante la E-ŝildon ni povis senpage viziti la urban muzeon.

Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris la belan urbeton *Besalú*. Pro sia ĉarmo ĝi estas invadita de turistoj. Ankaŭ ĉi tie ni ĝuis promenadon kun loka ĉiĉeronino kun brila tradukado de José María Salguero (Kani). Estis sufiĉe da tempo por trankvile ripozi, kafumi aŭ bierumi. Ankaŭ glaciaĵoj bongustis.


En la dua duontaga ekskurso ni promenis kaj admiris la belegan kaj ekzotikan botanikan ĝardenon *Marimurtra* en *Blanes*. Diversaj mediteraneaj kaj ekzotikaj plantoj kaptis nian atenton. Ankaŭ diversaj kakttoj, bambuoj kaj palmoj troviĝas tie. Ni eĉ gustumis kelkajn maturiĝantajn fruktojn ĵus falintajn de la arbo. Iuj fotiĝis kun papagoj.

Konklude la E-Semajno bone disvolviĝis. Dankon al la nova teamo pro tre agrablaj tagoj pasigitaj en *Tossa de Mar*.

*Liba Gabalda*  
teksto kaj fotoj

## Novajoj el la eldonejo KAVA-PECH

Ekde la 2-a numero de Starto, kie estis anoncitaj ĝistiamaj novaĵoj de KAVA-PECH en Esperanto, aperis minimume du pliaj libroj interesaj por esperantistoj:




Ĉeĥa versio de la libro de Jaroslav Karhan *Cesta k Harmonii J. A. Komenský – L. L. Zamenhof*. Ne temas pri traduko, sed pri originala verko, kiu havas interesan historion: Kiam mi demandis la aŭtoron pri la kopirajto por la ĉeĥa traduko de lia verko *La vojo al harmonio*, li afable respondis, ke li volonte konsentas ne menciante, ke li verkis unue la ĉeĥan version kaj nur sekve tiun en Esperanto aperinta pasintjare. Mi komencis serĉi tradukonton kaj alparolis ankaŭ Miroslavon Malovec. Miasurprize li respondis, ke li havas en sia komputilo eĉ du versiojn de la ĉeĥa manuskripto, ambaŭ pli malnovajn ol tiu en Esperanto, sed ĉiu el la tri versioj iel diferenciĝas.

Mi do demandis samideanon Karhan, kiun version uzi, sed ricevis la respondon, ke li ne plu havas iujn dokumentojn (kio kompreneblas en lia aĝo de 96 jaroj) kaj li petis min konsideri ĉiujn tri kaj kompili de ili la ĉeĥan version laŭ mia bontrovo. Tion mi promesis kaj faris laŭ miaj plej bonaj eblo kaj konscio. Krome, mi kompletigis la verkon pri 4 aldonaĵoj: ĉeĥaj tradukoj de la du plej konataj poemoj de Zamenhof (el kiuj unu fariĝis Esperanto-himno), trarigardo de Esperanto-gramatiko kun aldono de ligiloj al

retpaĝoj ĉe kiuj troveblas pli da informoj pri Esperanto, kaj resumon de la verko *Unueco en Diverseco* de O. P. Ghai, koncize priskribanta la plej disvastiĝintajn mondajn religiojn kaj surbaze de citaĵoj el iliaj ĉefaj sanktaj skriboj montras, ke ili ĉiuj rigardas al la bazaj homaj demandoj tre simile: tio rilatas eĉ al la konata ora regulo „(ne) faru al proksimulo, kion vi (ne) deziras ke li faru al vi.

La dua ĵus eldonita kaj lanĉita libro, nome *La ŝtono de la amo Elektitaj poeziaĵoj* de Sali Bashota en traduko de Bardhyl Selimi estis jam menciita en la antaŭa artikolo pri la jubileo de mia eldonejo. Mi nur aldonu, ke temas pri poezio kaj poezia prozo de unu el la plej elstaraj vivantaj poetoj de Kosovo, kiu en siaj verkoj respeguligas malĝojon, doloron kaj senesperon de albanoj en Kosovo, sed ankaŭ amon, revon kaj esperon je nacia revekiĝo. En sia verko plena de metaforoj kaj de arta prilaboro de la plej nova historio li ofte revenas ankaŭ al eventoj de pratempa historio kaj al mitologio.



Plia novaĵo de la eldonejo estas, ke ĉiu, kiu registriĝas en la retpaĝo [www.kava-pech.cz](http://www.kava-pech.cz), ricevados neregule (ĉiam sen aldonaĵoj) novaĵleterojn de la eldonejo: pri novaj eldonaĵoj, dumokazaj prezmalatigoj, invitoj al lanĉoj de novaj libroj, ktp. Krome ĉiuj registritaj personoj havas por ĉiam garantiatan rabaton de 10 % por ĉiuj siaj retaj mendoj.

*Petro Chrdle*

## VALORAJ DONACOJ POR NIA MUZEO

Unika kolekto de ĉ. 2000 Esperantaj bildkartoj (ciferecigitaj en

<http://www.eventoj.hu/posxtkartoj/>)

estis al nia muzeo malavare donacita en septembro 2017 de László SZILVÁSI el Budapeŝto - i.a. reprezentanto de **Kultura Esperanto-Asocio** kaj de la Fondaĵo Eszperantó, posedanto de Lingvo-Studio kaj de la sukcesa Esperanto-Lernejo.



La ideo ekestis kaj realiĝis kadre de nia libertempa vizito ĉe li. Fizika transdono el Písek al Svitavy planatas en printempo 2018 post bezonata prilaboro. ĈEA aparte aprezas tiun ĉi eksterordinaran riĉigon de sia muzea kolekto kaj klopodos fari maksimumon por la protekto kaj utiligo de la bildkartaro.

Valorajn librodonaĵojn por nia muzea biblioteko ni ricevis 12.10.2017 de la poetino kaj filologino Lidja LIGEZA, prezidantino de la **Krakova Esperanto-Societo**, dum kies kunveno mi prezentis la antaŭan vesperon la muzeon en Svitavy kaj la aktivecojn de ĈEA ĝenerale. La kontakto startis la eblecon de plua esperdona kunlaboro.

*Pavla Dvořáková*

## TEO kaj AMO

La 11minuta filmo "Patrino" de la ĈEA-membroj Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok akiris dum la Dua festivalo de Esperantaj filmoj "Teo kaj amo" (<http://esperanto.cri.cn/filme/>), okazanta en Ĉinio, unu el 10 premioj de la publiko kaj aperis en la nomumo por specialaj premioj pri scenaro, ĉefa aktorino kaj internacia kunlaboro.



La konkurson partoprenis ĉi-jare 77 filmoj el 27 landoj de 4 kontinentoj. Niaj premiitoj partoprenis la festivalon kun buntenhava Premidona ceremonio, kiu okazis la 26-an de oktobro 2017 en la ĉina urbo Duŝan kaj kiun vi povas spekti en tiu ĉi video. Presentis sin en ĝi ankaŭ la UEA-prezidanto Mark Fettes kaj la pranepino de d-ro Zamenhof Margaret Zaleski-Zamenhof. Pavol kaj Rostislav estis premiitaj ankaŭ kiel tiel nomataj "Anĝeloj" de la festivalo kaj transprenis premiojn por la festivalaj urboj Svitavy kaj Nový Jičín (en la video vidu ekde la 46-a minuto).

Artikolon pri la ceremonio kaj foton de Pavol Kaščák kun Mark Fettes alportis la revuo Esperanto en sia decembra numero. La ceremonion eblas spekti en la reto <https://www.youtube.com/watch?v=sj1GvWPTqWc>

*laŭ ĈEA-retkomunikoj*

## Nova servo por ILEI-membroj

Bonega kunlaboro regas inter nia instruista ligo kaj [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj tiu kunlaboro plu kreskas. Grava aspekto de tiu kunlaboro : la registrado de ĉiuj kursoj en la mondo okazas ĉe [edukado.net](http://www.edukado.net).

## Afrika muziko prezentita en la kontinenta bulteno

Jen la 32-a numero de la afrika bulteno *Esperanto en Afriko*, kies PDF formato eblas elŝuti per:

<http://www.esperanto-afriko.org/Esperanto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2032.pdf>,

Vi konatiĝos i.a. kun la nova talento de la afrikaj muzikistoj.

laŭ Adjé Adjévi

## Loka agado en grava loko

La Internaciaj Letertagoj "Vorto pri Samarkando", dediĉitaj al Tago de la Urbo, bone sukcesis. Multaj reeĥoj estis publikigitaj en nialandaj retaj kaj paperaj periodaĵoj, ekz. "Samarkandskij Vestnik" ("Heroldo de Samarkando") aŭ semajna familia gazeto "Lady", legata en diversaj partoj de nia lando. Ni esperas foje bonvenigi vin en la 2750-jara Samarkando, "Romo de l'Oriento".

Anatoli Ionesov

Enciklopedia projekto "Samarkandiana"  
P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando,  
Uzbekio, [imps86@yahoo.com](mailto:imps86@yahoo.com)

## Sekvaj eksteraj eĥoj de la 4a SAS

En la lasta tago de la SudAzia Seminario (SAS 4) venis intervjui kelkajn homojn ĵurnalisto el la Ĵurnalo *The Hindu*, kiu estas eldonita tra la tuta landego en 18 lokoj tra naŭ gubernioj. Ĝi estas la dua plej legata anglalingva ĵurnalo en la tuta Barato, kiu aperas en presita formo en meze 1,45 milionoj da ekzempleroj. La reta versio de la artikolo estas potenciale alirebla de milionoj da pliaj legantoj.

<http://www.thehindu.com/todays-paper/tp-features/tp-metroplus/the-magic-of-a-constructed-langauge/article19959293.ece>

## Denove, Azio kaj Oceanio kune

Tre bonvena estas la delonga kunlaboro inter Aŭstralio kaj Indonezio – landoj kulture tre malsamaj sed geografie ne tiom malproksimaj (aŭstralianoj havas aliajn ideojn pri distancoj ol ni plietlandanoj). Antaŭ du jaroj okazis la ege sukcesa Trilanda Kongreso, kune organizita de la landaj movadoj de Indonezio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Konforme kun la decido tie, la Dua Trilanda Kongreso okazos en 2018, denove en Indonezio.

## Aktivulo.net kreskas

La retejo de UEA de kaj por aktivuloj kreskis. <http://aktivulo.net/>

## Eŭropa bulteno

La plej freŝa numero:

<http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

## Interesaĵoj

**Princlando Hutt River** estas farmo (7480 ha) en Aŭstralio, kies posedanto Leonard Casley proklamis ĝin princlando (1972) kun oficialaj lingvoj angla, franca kaj Esperanto. Li eĉ eldonis propran monon. Kompreneble, tia princlando ne estas rekonata de la aŭstralia registraro, nek de aliaj ŝtatoj, tamen en la angla Vikipedio ĝi havas detalan artikolon kiel interesa kuriozaĵo.

**Internacia Esperanto-Sumoo** estas speco de legado-konkurso de Esperantaj libroj. En septembro 2009 ĝin fondis japano HORI Jasuo kaj ĝis nun aliĝis pli ol 6 000 konkursantoj. Se vi volas partopreni, iru al la retejo:

[www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html](http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html)

Vi povas trovi informan artikolon ankaŭ en Vikipedio.

**UEA ŝanĝas sian ĝeneralan direktoron.** D-ino Veronika Poor estos anstataŭigita de Martin Schäffer ekde la 1-a de januaro 2018.

**Mondmapo kun E-Asocioj kaj kluboj.** Vizitu la retejon:

<http://esperanto.net/eo/lokaj-organizoj>

kaj kontrolu la informon pri via urbo. Se vi trovas eraron aŭ mankon en la mapo, bonvolu indiki tion per nia formularo: <http://tinyurl.com/mondmapo>

**Kongresa temo en Lisbono:** *Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?* La grandaj maraj imperioj de Britio, Francio, Nederlando, Hispanio kaj Portugalio sukcesis ekregi sur granda parto de la terglobo. Ĉu ni esperantistoj povas disvolvi novan vizon pri la estonteco?

**Biblioteka apogo Bachrich** subvencias 8 bibliotekojn: Kolombia Esperanto-Ligo (231,05 €), Berlina Esperanto-Ligo (123,92 €), Slovacia Esperanto-Federacio (164,93 €), Brazila Esperanto-Ligo (224 €), Kuba Esperanto-Asocio (327,05 €), Asocio Solidareca Bonvolo (Kongo, DR, 61,00 €), Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (235,95 €), Triesta Esperanto-Asocio (Italio, 133,78 €).

**UEA serĉas kunredaktantojn** de la retejo <http://esperanto.net/eo/>. Vi povas vidi detalojn pri la laboro ĉe: <http://tinyurl.com/redaktanto>.

**Fotogalerio de Ĉeĥa Esperanto-Junularo:** <https://goo.gl/wrFEqU>

Se vi volas aldoni viajn fotojn, skribu al [tomasstano95@gmail.com](mailto:tomasstano95@gmail.com).

**Nenia klubo de stranguloj** estas titolo de artikolo, verkita de Petr Chrdle kaj aperinta en la gazeto Respekt la 16-an de oktobro 2017. La origina titolo estis *130 jaroj de Esperanto*, sed ĵurnalistoj ŝanĝis ĝin por allogi legantojn. Legu ĉe: <https://www.respekt.cz/tydenik/2017/42/zadny-klub-podivinu>

**Nia muzeo en la retejo Mapy.cz**

<https://mapy.cz/zemepisna?x=16.4654125&y=49.7498167&z=14&source=base&id=2131242>

**Akademio de Sciencoj en Prago,** Biografia Arkivo de Literatura Instituto, kolektas informojn pri niaj esperantlingvaj aŭtoroj, tradukistoj, vortaristoj. Kiu ion verkis, skribu al redaktoro de Starto ([starto@esperanto.cz](mailto:starto@esperanto.cz)) kaj li sendos al vi enketilon de la biografia arkivo. Esperanto penetru ankaŭ tien!

## Internacia Renkontiĝo en Svitavy

De la 22a ĝis la 28a de septembro 2017 la Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy aranĝis Internacian Renkontiĝon. Partoprenis ĝin 26 esperantistoj el Anglio, Francio, Germanio, Pollando, Slovakio kaj el Ĉeĥio.



La programo komenciĝis matene je la 8a horo kaj ofte finiĝis post la 22a horo vespere. Vendrede vespere okazis interkonatiĝa kunveno. Johano Moser el Berlino en supra granda salono pianludis por ni.

Sabate antaŭtagmeze Libuše Dvořáková prezentis la regionon, la Esperanto-Muzeon kaj la lokan Esperantan klubon. Posttagmeze partoprenantoj trarigardis la urbon, kie okazis Festo de Sankta Venceslao. Antaŭ la vespermanĝo ni vizitis la urban muzeon kaj galerion kun ekspozicio de malnovaj lavmaŝinoj kaj kun ekspozicio pri la fama svitavano Oskar Schindler, savinto de multaj judoj dum la Dua Mondmilito. Petro Chrdle, honora membro de la loka klubo, prezentis sian eldonejon KAVA-PECH, novajn librojn, precipe librojn pri F. V. Lorenz (en Esperanto kaj en la ĉeĥa) kaj la novan *Grandan Esperantan-Ĉeĥan Vortaron*.

Dimanĉe ni ekskursis en la urbon

Chrudim, plue en la vilaĝon Ležáky kun la monumento memoriganta la neniigon de la tuta vilaĝo flanke de germanaj nazioj, kaj en la subĉielan etnografian muzeon Veselý Kopec (Gaja Monteto). Vespere anoj de la teatra grupo DOMA prezentis por ni la teatraĵon *El la vivo de insektoj*, kiun ili prezentis ankaŭ dum la 102a UK en Suda Koreio.




Lunde ni promenis tra la parko de lokaj patriotoj, tra akvodistribueja arbaro, ni ankaŭ trarigardis la rekonstruitan Svitavan stadionon. Posttagmeze Petro Chrdle prezentis prelegon “Produktado de Esperanto-libroj sojle de la 3a jarmilo. Spertoj de profesia eldonisto”. Vespere Dagmar Martinková projekciis fotojn el Seulo. Marde ni vizitis la kastelon Svojanov, la urban muzeon kun la galerio Polička, turon kun la naskiĝĉambreto de la komponisto Bohuslav Martinů, supron de bone konservitaj urbaj muregoj. Vespere Teresa Pomorska el Pollando rakontis pri Esperanto-aranĝoj en Pollando. Merkrede ni veturis en la urbon Kroměříž. Tie ni admiris la kastelon kaj Florĝardenon, kiuj estas registritaj en la listo de kulturaj heredaĵoj de Unesko. Vespere ni kantis, Georgo Stefański akompanis nin per gitarludo.

**Libuše Dvořáková**

# Kiel ekestis nova vortaro

Miroslav Malovec

Proksimume en la jaro 1983 ekdeziris Zdeněk Hršel krei novan poŝvortaron, kiu povus aperi en la jubilea jaro 1987. Li traktis kun Ŝtata Pedagogia Eldonejo kaj ricevis konsenton, ke la vortaro povas esti 3,5-oble pli granda ol la poŝvortaro de Hromada.



Al siaj pluraj kunlaborantojn li disdonis slipetojn, sur kiujn ni devis skribi ĉiujn vortojn de Hromada-vortaro (ĉiun neston sur unu slipeto). Ĉiu kunlaboranto ricevis unu literon, poste alian, ĝis ĉiuj vortoj estis sur slipetoj.

Kiel ĉefajn kunlaborantojn Zdeněk Hršel akceptis min kaj Karel Kraft. Kontrolantoj estis Zdeněk Pluhař, Josef Kavka, Věra Barandovská kaj Josef Hradil. Nun venis la dua fazo, aldoni pluajn vortojn. Por la ĉeĥa-esperanta parto servis al ni kiel modelo la germana poŝvortaro (3,5-oble pli granda ol Hromada), ni devis aldoni ĉiujn vortojn, kiuj estis en la germana vortaro, sed ĉe Hromada mankis.

Iom pli komplike estis ĉe la esperanta-ĉeĥa parto, ĉar tie ni devis serĉi en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) kaj decidi, kiujn vortojn enmeti kaj kiujn ne. Estis malfacile, ĉar ĉiu homo havis alian opinion. Plie la eldonejo postulis, ke ni respektu la kutimojn de la eldonejo, t.e. *eliri* estu sub E, *foriri* sub F, *trairi* sub T, dum en la esperantaj vortaroj estas kutimo meti ĉiujn en la neston *iri*.

Poste ni devis ĉion skribi per skribmaŝinoj kun normala skribo (mi devis aĉeti novan, ĉar mi ĝis tiam uzis maŝinon kun eta skribo), sur ĉiu listo devis

esti 60 linioj po 60 literoj. Kiam ni transdonis la tajpaĵon al la eldonejo, ilia eksperto pri leksikografio trovis multajn mankojn, ekz. ke internaciismoj devas esti sur la unua loko: **adekvata** adekvát-ní, přiměřený, odpovídající (ni havis: **adekvata** přiměřený, odpovídající, adekvát-ní).

Retajpado tiom malfruigis la aferon, ke ni ne sukcesis fini en 1987, nek en 1989 kaj en 1990 la eldonejo deklaris, ke ili nun eldonas nur la anglan, sed aliflanke ni povas eldoni la vortaron mem, ĉar ni havas liberecon. Do ni daŭrigis la laboron.

En mia laborloko en Zbrojovka mi jam en 1988 ricevis maŝinon, antaŭulon de komputiloj. Ĝi havis diskojn grandajn kiel gramofon-diskoj kun kapacito 250 kb, literojn minusklajn kaj majusklajn kun la ĉeĥa diakritiko, sed ne sciis dikajn nek kursivajn literojn. Post la revolucio regis en la fabriko necerteco, la laboroj preskaŭ haltis kaj mi misuzis la situacion por sekrete enkomputiligi nian vortaron. Anstataŭ ĉapeloj mi uzis apostrofon (c'irkau' = ĉirkaŭ). Sed kiam mi estis maldungita, minacis danĝero, ke mi perdos la rezulton de mia laboro. Sed feliĉe oni vendis al mi la maŝinon kontraŭ 3 mil kronoj.

Tiutempe mi jam fariĝis redaktoro de Starto, teknike helpis al mi Karel Daněk, kiu eĉ aĉetis normalan komputilon, li trovis ankaŭ lertan presiston en Podolí u Brna, kien ni ĉiam portis diskedon kun nova Starto. Foje ni tie renkontis kuzon de la presisto, kiun mi konis el Zbrojovka. Li diris al mi, ke ankaŭ li volus por ni presi. Mi respondis, ke mi havas miajn tekstojn sur grandaj diskoj. Li poste prizorgis transigon de tiuj tekstoj sur normalajn diskedojn inkluzive de la

vortaro. Niaj komunaj laboroj estis Jarlibro de ĈEA, Kongres-libro de komuna ĉeĥa-germana kongreso en Karlovy Vary kaj Milito kontraŭ Salamandroj de Karel Čapek en traduko de Josef Vondroušek. Tial la presisto pruntis al mi eĉ komputilon, por ke mi povu pli bone ĉion prilabori.

Mi kompreneble uzis la ŝancon ankaŭ por la vortaro, precipe ŝanĝi la apostrofon al ĉapeloj, dikigi kaj kursivigi la koncernajn vortojn. Tiun komputilan laboron kapablis fari ankaŭ Karel Kraft. Kaj kiam Petr Chrdle decidis eldoni la Esperantan-ĉeĥan parton memstare, Karel Kraft faris la definitivan redakton. Hršel ne estis kontenta pri la vortaro kaj deklaris, ke li ne volas esti indikita kiel aŭtoro, tial la vortaro aperis sub la nomoj Kraft-Malovec (1995). Kaj kiam Karel preparis ankaŭ la ĉeĥan-esperantan parton (1998), mi konsentis, ke mi estu menciita nur kiel helpanto, ĉar al eldonisto kaŭzas du aŭtoroj problemojn en kontakto kaj Karel faris plejparton.

En 2013 Petr Chrdle proponis al mi prepari novan eldonon de la Esperanta-ĉeĥa parto. Kiam li telefonis al Karel pro la aŭtoraj rajtoj, eksciis de la edzino, ke Karel estas en sanatorio, neniun rekonas, do li eĉ ne kapablas ion ajn subskribi. Jam pro tio mi devis fari tute novan vortaron, por ke mi povu esti subskribinta kiel sola aŭtoro.

Mi konsentis sub du kondiĉoj: ke mi povas meti ĉiujn derivaĵojn denove sub iliajn radikvortojn kaj enmeti preskaŭ ĉiujn vortojn kaj derivaĵojn, kiuj estas en PIV, ĉar multajn vortojn ĉeĥaj esperantistoj ĝis nun ne konas. Petr post certa hezitado konsentis.

Unue mi skanis la vortaron de 1995 (tiam ni viŝis ĝin post presado, ĉar tiamaj

harddiskoj havis malgrandan kapaciton), OCR-programo deĉifris la literojn, sed necesis denove dikigi kaj kursivigi la vortojn. Kun tiu laboro helpis al mi Vladimír Türk, Jaroslava Malá kaj Jindřiška Dubinová. Tiun version el 1995 mi konservis kiel dokumenton.

Nun mi kreis en mia komputilo adresaron nomatan 2014 kaj kopiis en ĝin la vortaron por plua prilaboro. Unue mi ĉiujn derivaĵojn ŝovis en iliajn nestojn, ekz. *malgranda* sub **granda**, *forkuri* sub **kuri** ktp. Poste mi dishakis la vortaron tiel, ke ĉiu litero havu propran dosieron, sume 25 dosierojn. Unue mi komencis prilabori la literon Z, ĉar ĝi havis malplej da paĝoj kaj tial taŭgis por unua eksperimentado. Ĉiam mi elektadis la malplej ampleksajn literojn, por ke ili estu baldaŭ faritaj. Tiamaniere mi faris iluzion, ke la laboro rapide progresas, por trompi mian maldiligentecon. La lastaj literoj estis P, S kaj K, kiuj estis la plej ampleksaj, kun plej multaj paĝoj.

Ĉe prilaboro de iu litero mi procedis jene: unue mi kompletigis jam ekzistantajn nestojn per derivaĵoj, kiuj troviĝas en PIV, Krause kaj aliaj gravaj vortaroj. Poste mi enskribis ĉiujn vortojn, kiu tute mankis, kaj reveninte al la unua paĝo mi serĉis vorton post vorto la ĉeĥajn tradukojn. Estis tie nomoj de urboj, nacioj, bestoj, floroj, medicinaj esprimoj, poetismoj kaj ankaŭ esprimoj de normala vivo. Mi serĉis en Vikipedio, reta vortaro medicina kaj biologia, kontrolis ĉe Josef Hron, enrigardis ĉeĥajn enciklopediojn, akademian vortaron de fremdaj vortoj k.s.

Kiam la litero estis preta, mi sendis ĝin por kontrolo al Zdeněk Pluhař, kiu faris tiel multajn korektojn, ke la vortaro almenaŭ el 25% estas lia. *(daŭrigota)*



## Anna Löwenstein en Prago

Membrino de la Akademio de Esperanto, aprezata brita verkistino Anna Löwenstein, aŭtorino i.a. de historiaj romanoj el Antikva Romo "*La Ŝtona Urbo*" kaj "*Morto de artisto*" kaj edzino de la eksa UEA-prezidanto Renato Corsetti, vizitis 20.-22.9.2017 nian ĉefurbon. Ŝi estis invitita de la ĉeĥa ŝtato por partopreni en Lidice solenan ceremonion, dum kiu ŝi publike transdonis al la komunumo kaj ties galerio grandformatan olepentraĵon "*Lidice*" de la brita pentristo Stan Young (\*1920). Li kreis ĝin en 1957 post vizito de la komunumo, kies sorto profunde tuŝis lin. Ĝi estis origine mendita supozeble de la komunumo mem, sed fine pro miskomprenoj koncerne pagon de sendokostoj ne estis liverita kaj fine koincide restis en posedo de la gepatroj de Anna.



Post pli ol 60 jaroj la familio decidis oferti la bildon fine tien, kien ĝi apartenas. Dank al intereso kaj aktiveco de la Ĉeĥa Ambasadorejo en Londono la intenco sukcesis realiĝi. La publikan ceremonion, okazintan la 21-an de septembro, partoprenis ankaŭ Libor Sečka, ambasadoro de Ĉeĥio en Britio, kaj Lubomír Zaorálek, ministro pri eksterlandaj aferoj de ĈR (vidu la

[ĉeĥlingvan presraporton](#)). Pri la evento informis ankaŭ la [Ĉeĥa Radio](#).

Anna Löwenstein esprimis la deziron antaŭ sia forflugo kontaktiĝi laŭeble kun lokaj esperantistoj. Ĉar per nekredebla koincido mi (nun nepragano) troviĝis samtempe preskaŭ samloke, mi volonte transprenis rolon de ĉiĉerono kaj agrable babilante mi montris kaj rakontis al ŝi pri belaĵoj de la kastela kvartalo Hradčany, kion ŝi evidente ĝuis.



Anna

*Löwenstein antaŭ Loreto*

Mi informis ŝin ankaŭ pri la nunaj aktivecoj de ĈEA kaj pri nia muzeo en Svitavy. Donace mi kreis por ŝi [ĉeĥlingvan artikolon en Vikipedio](#) kaj publikigis pri ŝi informojn kaj libere disponeblan parton de ŝia romano "[La Ŝtona Urbo](#)" en la muzea paĝo ĉe Ipernity. Kiel etan kulturalan donaceton ŝi ricevis ankaŭ la ĈEA-eldonaĵon - la kompaktdiskon "*Kun kanto ĉirkaŭ la mondo*". Mian rolon de akompananto sekve bonege transprenis Jan Šebetovský el ĈEJ kaj la praga klubo, al kiu mi ĉi-loke dankas. Estis por mi honoro kaj vera plezuro ekkoni persone tiun ĉi raran simpatian virinon kaj mi esperas, ke la ligitaj kontaktoj plu evoluos kaj portos al ĈEA riĉigajn spertojn.

*Pavla Dvořáková*

# KLUBA VIVO

**Olomouc:** ŝanĝo de la tempo de kunvenoj: ĵaŭde de la 16-a ĝis 18-a horo, la loko restas: klubejo VSMO en Vlastivědné muzeum.

**Česká Třebová:** Silvestro okazos la 29.12.2017 je la 19-a horo en Malý sál, Národní dům, strato Kozlovská. Kotizo 220 Kč. Aliĝojn akceptas Inĝ. Ladislav Kovář [kovar.lad@email.cz](mailto:kovar.lad@email.cz). Temo de la vespero: En sana korpo sana spirito.



**Svitavy:** Dimanĉe la 5-an de novembro 2017 la klubo E-mentál Praha okazigis sian tradicion renkonton **Tosto por Zamĉjo**, ĉi-foje en Svitavy. Kunvenis 20 favorantoj de Esperanto. Loka klubano



Jan Richtr konatigis la partoprenantojn kun la historio de la urbo, ĉiĉeronis al ili en la preĝejo turo kaj ebligis tie pendigi Esperanto-flagon por fotado. Posttagmeze ĉiuj kolektiĝis en Esperanto-

Muzeo kaj ankaŭ tie ili pendigis la flagon.

*Libuše Dvořáková*

**Brno:** Aperis nova broŝuro pri *Skaraboj, papilioj kaj aliaj insektoj antaŭ objektivo* de Oldřich Arnošt Fischer, kiun oni povas aĉeti ĉe la aŭtoro kontraŭ 150 Kč je lia

adreso: Brno:  
[olda.morav@seznam.cz](mailto:olda.morav@seznam.cz)



**Praha:** Novan numeron de la klubula bulteno oni povas elŝuti ĉe la adreso <http://bulteno.cs-retromusic.net/>



Oni trovas tie feston de KAVA-PECH, kelkajn rakontojn (unu ĉeĥlingva, tradukita el Eseranto), proponon de novaj libroj, poemojn k.s.

**Prostějov:** La klubo preparis laborplanon por 2018 – rondeto de junaj skoltoj, disponigo de la klubejo ankaŭ por oldskoltoj, invitado de gastoj, kunlaboro kun najbaraj kluboj, kompletigo de gazet-kolektoj, informado de la publiko.

**Netolice:** Projekto Retradio de Anton Oberndorfer el Aŭstrio elsendas por vi ĉiutage novan kelkminutan programon pri variaj interesaj temoj. Kontribuas ankaŭ Jaroslava Malá el Bavorov kun teknika subteno de Vladimír Türk el Netolice. Ekz. *Lerni lingvon por peti bieron? La homo, kiu savis historion. Ju pli bona la mondo, des pli saĝaj la homoj. Kulturoj de mensogado k.a.*

<http://members.aon.at/aldone/retradio/>

**Opava – Písek:** 8.10.2017, kadre de la vizito de Vladimír kaj Pavla Dvořák el EK Písek en Opava, prezidanto de la loka klubo Vlastimil Kočvara brile ĉiĉeronis tra la urbo. La promeno okazis ne nur tra turismaj vidindaĵoj, sed ankaŭ surspure de la historio de Esperanto en Opava, pri kiu li nuntempe detale esploras kaj pretigas studon.



*V. Kočvara en Matice slezská*

La samo okazas nun en Písek, lige al proksimiĝanta datreveno de 110 jaroj de Esperanto en la urbo kaj preparo de la tiutema broŝuro. V. Kočvara estis la unua Esperanto-instruisto de M.Smyčka - eĉ se li estis je 10 jaroj pli juna. En 1955, ankoraŭ kiel mezlerneja studento, li okazigis lingvokurson i.a. por geaktoroj de la opava teatro, kie M. Smyčka akiris sian unuan solistan artistkontrakton. Estis interkonsentite, ke V. Kočvara klopodos kontakti la teatron kaj ev. serĉi en ties arkivo dokumentojn pri la tiama aktivado de M.Smyčka.

Samtempe estis pritraktite, ke el la nekredeble riĉa bibliografio de la artikoloj de V. Kočvara, kiun li eldonis en 2016 sub la titolo "*Účtenka života*" (Kvitanco de la vivo) estos almenaŭ la plej gravaj artikoloj skanitaj kaj disponigitaj en la asocia datumbazo kaj en nia muzeo en Svitavy.

## Teatraj rememorarangoj omaĝe al Miroslav Smyčka

La 16-an de oktobro 2017 trideko da membroj de la Klubo de geamikoj de la **Sudbohemia Teatro en České Budějovice** kunvenis por pli ol du horoj en la teatra kunsido. La aranĝon iniciatis la plej proksima amiko de [M. Smyčka](#) s-ro Miloš Dědič kaj pretigis ĝin kunlabore kun Pavla Dvořáková el EK Písek. El la bunta programo disponeblas 2 videoj de V.Türk - la resuma kaj la rilata al Esperanto (vidu [ĉi-tie](#)).

La filino de M. Smyčka, aktorino, kantistino kaj dublistino Jolana Haan Smyčková iniciatis renkontiĝon kun geamikoj kaj aktivaj favorantoj de ŝia patro la 22-an de novembro 2017.

Tiutage pluraj el ni kunvenis unue en la tombejo Olšany en Prago, kie ni vizitis lian belan nove pretigitan tombon (eĉ kun la tabuleto "Esperanto parolata!").

Entute 17 partoprenantoj el diversaj urboj kunvenis sekve en Dejvice en la kafejo de la **teatro SEMAFOR** (kies membrino J. Smyčková estas), kie okazis rememorado kaj babilado kun dolĉumado.

Dum ambaŭ okazoj ne mankis registraĵoj kun la voĉo de M. Smyčka. Fine la partoprenantoj povis favorpreze spekti la komedion "*La rompita koro de S-ino Pamela*", en kiu J. Smyčková plenumis la ĉefrolon.

Dankletero nome de ĈEA estis de Semafor favore akceptita kaj sekva kunlaboro planatas. Plua publika kultura aranĝo estas dume antaŭvidata por aprilo 2018.

(Sekvu Kalendaron en Esperanto.cz).-

*padv-*

## Jubileoj

Ni gratulas al jenaj samideanoj, kiuj jarfine festas siajn vivjubileojn

Lenka Bloudková  
Roman Branberger  
Zdenka Folková  
Ing. František Holeček  
Milan Kazdera  
Zdeněk Khun  
Rozálie Kusíková  
Bohuslava Pelcová (*honora membrino de ĈEA, helpantino al nevidantoj*)  
Bohumil Staněk  
Zdeněk Šlosárek  
Věra Tomíčková  
Hana Vencovská  
Karel Vitásek  
Pavel Vladyka  
Věra Votrubcová



## INTER-FEST en Bjelovar

Komence de aŭgusto 2017 organizis kroatia klubo en Bjelovar internacian renkontiĝon INTER-FEST. Krom aliaj aranĝoj oni faris ekspozicion de infanaj desegnaĵoj je temo "La flugiloj de fantazio". Mi, kiel iama direktorino de infanĝardeno en nia vilaĝo Světice (ĉe urbo Říčany ĉe Prago), do - mi petis novan direktorinon pri kelkaj desegnaĵoj de la infanoj. Same mi ricevis ankaŭ kelkajn belajn bildojn de la pli grandaj infanoj de nia baza lernejo. Sufiĉe grandan paketon mi junio sendis al la organizantoj kaj nun, oktobre, ni ricevis tre belan, ĝojigan respondon: inter 300 infanaj desegnaĵoj malgranda knabineto el la infanĝardeno gajnis 2-an premion

kun ŝia bildeto de temo "Kiam mi estos granda, mi fariĝos ŝoforino de aŭtobuso" - ŝi vere desegnis nigre blankan aŭtobuson. Laŭdan mencion gajnis knabineto ankaŭ de la infanĝardeno kun desegnaĵo "Gajaj terpomoj". La organizantoj sendis al ni diplomojn, medalon, katalogojn de la ekspozicio kaj kelkajn belajn bildkartojn de la urbo Bjelovar. La infanoj kaj iliaj gepatroj, instruistinoj, kaj kompreneble ankaŭ mi - ni ĉiuj estis ege ĝojigitaj...

LChal

## Pri Petr Bezruč en Esperanto

La silezia kultura institucio *Malice slezská*, filio en Hradec nad Moravicí, eldonis antologion de artikoloj omaĝe al la 150-a datreveno de la naskiĝo de poeto Petr Bezruč sub titolo *Jako v nebi, tak i na zemi* (Kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero).

La legantoj tie trovos artikolojn pri instruisto Ĉeněk Kanclír (1876-1942), amiko de Bezruč, pri literatura festivalo en Branka, pri la vojaĝoj de la poeto al Vítkov-regiono, pri pola kaj ĉeĥa literaturoj en la silezia regiono kaj ankaŭ pri esperantlingvaj tradukoj de lia poezio.

*Dílo P. Bezruče v mezinárodním jazyku* (Verkaro de P. Bezruč en la internacia lingvo) estas titolo de artikolo verkita de Vlastimil Kočvara. Li mencias unuajn esperantigojn de Stanislav Schulhof kaj Vladimír Adamík, sed precipe la majstrajn interpretojn de Rudolf Hromada, Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr, kiuj servis ankaŭ kiel bazo por tradukoj en la japanan kaj ĉinan lingvojn.

mm

## Ni kondolencas

■ La 6-an de septembro 2017 forpasis s-ro **Rudolf Ulrich** (96j) el Pardubice.

■ La 1-an de novembro 2017 forlasis nin s-ino **Eva Novotná** (\*1952). Ŝi ofereme laboris en diversaj asocioj, gastigis amikojn el eksterlando, belajn tempojn nia Rondeto de D-ro Hradil pasis en ŝia bone prilaborita ĝardeno.



■ La 10a-n de novembro 2017 mortis s-ino **Věra Mihulková** (83j) el Žamberk.

### Zdenka Novotná

(1933-2017)



La 21-an de septembro 2017 forpasis honora membrino de ĈEA **Zdenka Novotná**.

Ŝi estis multjara esperantistino, prezidantino kaj kronikistino de Esperanto-Rondeto „Amikeco“ en Česká Třebová. Ŝi aktive laboris ankaŭ en AEH kaj IKUE.

Laŭprofesie instruistino, ekde la jaro 1986 ŝi ofereme instruis Esperanton al lernantoj en bazaj lernejoj en Česká Třebová, Opatovec kaj Brandýs nad Orlicí. Kun „siaj“ infanoj ŝi preparis propagandajn programojn, organizis scene-tojn, dancetojn, kantetojn ktp., kiujn ili sukcese prezentis en diversaj aranĝoj, -asociaj konferencoj, renkontiĝoj kaj ankaŭ eksterlande – Francio, Anglio, Pollando, Hungario, Italio, Latvio, Kroatio. La programoj havis ĉie grandan sukceson. Zdenka Novotná aperis ĉie,

kie ŝi estis necesa por Esperanta movado. Ŝi ankaŭ havis pudelinon Katy, kiu komprenas Esperanton.



Sian ampleksan kolekton pri popul-kostumitaj pupoj, kiun ŝi arigis dum siaj eksterlandaj vojaĝoj, ŝi donacis al Esperanto-Muzeo en Svitavy, en kiu unuopaj partoj de ĝi ankaŭ estis plurfoje ekspoziciitaj



-mm-

### Miloš Lukáš (1897-1976)

Antaŭ 120 jaroj naskiĝis unu el niaj plej grandaj tradukistoj kaj stilistoj, gimnazia profesoro de la greka lingvo. Lia plej fama traduko *Nokto en Karlův Týn* estis ludata dum UK en Prago 1921. Li postlasis centojn da tradukitaj poemoj kaj rakontoj.

## Jak platit svazu

### Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

## Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz). Předplatné uhradíte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.



**Monato:** 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč  
**La Gazeto:** 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto:** nur reta versio 410,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

**Juna Amiko:** 350,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5, reta versio 190 Kč

**Literatura Foiro:** 1220,- Kč (\*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5 (\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

**Heroldo de E-o - de la nova jaro estas preparata monata gazeto, detaloj kaj abontarifoj ankoraŭ ne estas konataj. Al interesuloj mi skribos detalojn pli poste!!**

Periodikum Českého  
esperantského svazu, z.s.  
48. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
starto@esperanto.cz  
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku  
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:  
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice,  
vratislav.hirs@esperanto.cz,  
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2018

-----  
-  
Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
48-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster  
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,  
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva  
numero: 1.2.2018

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

## KALENDARO

2017-12-29 Esperanta Silvestro en Ĉeská  
Třebová, Info: [kovar.lad@email.cz](mailto:kovar.lad@email.cz)

2018-02/03 Hodonín: Je esperanto mrtvý jazyk?  
Info: [pavla.dvorakova@esperanto.cz](mailto:pavla.dvorakova@esperanto.cz)

2018-04-13/15 la 13-a BIERO Třeboň  
Info: [e-mentalprago@seznam.cz](mailto:e-mentalprago@seznam.cz)

2018-05-19 20 jaroj de EK Benešov  
Info: [leonarda.ch@seznam.cz](mailto:leonarda.ch@seznam.cz)

2018-06-17 Grimpo al Granda Ĉantorio  
Info: [suchanekj@seznam.cz](mailto:suchanekj@seznam.cz)

2018-07-16/28 2-a etapo Lančov

2018-07-30/08-11 3-a etapo Lančov

2018-08-12/12 Lančov: Renkontiĝo de eksaj  
tendaranoj, Info: <http://set-lancov.cz/>

2018-08-06/13 Poděbrady: Ekumena kongreso,  
Info: [polnickypavel@seznam.cz](mailto:polnickypavel@seznam.cz)

2018-09-14/16 Dek jaroj de Esperanto-Muzeo  
en Svitavy, Info: [muzeum@esperanto.cz](mailto:muzeum@esperanto.cz)

2018-10-12/14 Konferenco de ĈEA en Benešov  
Info: [leonarda.ch@seznam.cz](mailto:leonarda.ch@seznam.cz)

2018-12-08 Antaŭkristnaska Renkontiĝo en  
Písek, Info: [pisek@esperanto.cz](mailto:pisek@esperanto.cz)

2018-12-29 Silvestro en Ĉeská Třebová  
Info: [jk.esperanto@seznam.cz](mailto:jk.esperanto@seznam.cz)

## Eksterlande

2017-12-26/01-02 JES – Junulara Semajno,  
Info: <http://jes.pej.pl/eo/>

2018-01-04/07 Poludnica,  
Info: [poludnica83@gmail.com](mailto:poludnica83@gmail.com)

2018-03-07/11 Bibliaj Tagoj en Mainz

2018-05-19/25 IFEF-kongreso en Wrocław

2018-05-19/21 Eŭropa Festivalo de Esp. Kantoj  
en Vroclavo (PL),

Info: [informado.eo@gmail.com](mailto:informado.eo@gmail.com)

2018-07-14/22 SES, Slovakio,

Info: <http://ses.ikso.net/2018/>

2018-07-28/-08-04 UK Lisbono  
<https://uea.org/kongresoj/UK/2018>



## PLI DA INFORMOJ ĈE

<http://www.esperanto.cz/eo/akce>

[www.eventoj.hu/kalendaro.htm](http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm)



Septembra renkontiĝo en Svitavy



R.Čubok kaj P. Kaščák transprenas en Dušan (Ĉinio) premiojn de la Anĝeloj de la 2-a Filmfestivalo "Teo kaj amo".



Tosto por Zamĉjo en Svitavy



J. Smyčková en Semafor, kun la filo Kristiánek kaj kun L.Chaloupková kaj L. Angelová



Antaŭ la vinkelo en Kroměříž



Tosto omaĝe al M. Smyčka